Vi lernos, kaj praktikos

Ĉu . . . aŭ . . . ?

1 Ĉu Londono estas en Anglio aŭ Francio?
2 Ĉu Madrido estas en Italio aŭ Hispanio?
3 Ĉu Moskvo estas en Rusio aŭ en Ĉinio?
4 Ĉu vi estas en Usono aŭ _____ ?

5 Ĉu mi estas en Parizo aŭ _____ ?
6 Ĉu vi estas instruisto aŭ lernanto?
7 Ĉu mi estas lernanto aŭ instruisto?
8 Ĉu vi fartas tre bone, aŭ bone, aŭ mezbone?

9 Ĉu vi estas lernanto de la germana lingvo aŭ lernanto de Esperanto?
10 Ĉu vi estas en kurso de matematiko aŭ kurso de Esperanto?
11 Ĉu mi estas lernanto de biologio aŭ lernanto de Esperanto?
12 Ĉu Madrido estas lando aŭ urbo?

13 Ĉu Francio estas lando aŭ urbo?
14 Ĉu la instruisto nomiĝas Johano aŭ _____ ?
15 Ĉu ni estas en kurso de la angla lingvo, aŭ de Esperanto?
16 Bonvolu ripeti la paĝon! Dankon!